**ESTRARO**
**de**
**« ESPÉRANTO-GIRONDE »**
* * * * * * * * *

Centre Culturel  Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale :
347771 F Bordeaux

*****************

Prezidanto : Joël LAJUS
1 Les Places
33910 SABLONS DE GUITRES
Tel : 05 57 69 26 96
Mail : lajus.joel@wanadoo.fr

Sekretario : vaka posteno

Kasistino : Monique DUSSENTY
76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel : 05 56 06 74 49
Mail : monique.duss@free.fr



La « Espéranto-Gironde » Informilo

NOVEMBRO 2011



N° 129

# ZAMENHOF-TAGO EN MARGUERON sabaton la 17an de decembro 2011

**Vidu la programon de la tago je paĝo la 9a**

**Kaj venu multnombraj festi**

**nian amikinon**

**SABINE**

## Ĝenerala kunsido de Esperanto-Gironde en Margueron
**24an de Septembro 2011.**

Ni komencis je la 11a, kun 22 partoprenantoj kaj 4 senkulpigitoj.

**AGAD-BILANCO**: faris Joël.

5 renkontoj okazis dum la lasta jaro.

- **en Montendre**, la tiea grupo invitis nin por la Z .tago.

En Aprilo 3 eventoj ebligis al ni informi pri esperanto:

- **en St Ciers sur Gironde**: Janine prezentis Esperanton en la mediateko;
- **en Cambes**, pli ol 100 personoj venis por aùskulti Jacques Yvart kaj Famo (Marcelo kaj la urbestraro zorgis pri tiu renkonto);
- **en Libourne**, la galgona grupo invitis Kapriol, kiuj dancigis
- 50 personojn;

- en Majo, denove **en Libourne** estis prezentitaj la kongresoj de Kubo kaj Sète.

**LEGI**. Nur 3 informiloj estis senditaj, de Monique per la reto, kaj de Bruno per la poŝto.

.

**KURSOJ**:

**En Galgon**: 2 kursoj ĉiun vendredon kun 8 progresantoj.

**En Cenon**: ĉiun lundon (4 - 7)

**En universitato**: finite ?

**En Ste Foy la Grande**: Marielen gvidis kelkajn kursojn en mezgrada lernejo; venontaj animadoj okazos en lernejoj.

**En Montendre**: 6 membroj regule partoprenis, inkluzive 2 el Saintes.

**En Gujan-Mestras**



Ne fordonu vin al tiuj kontraŭnaturaj homoj, tiuj maŝinhomoj kun maŝinmensoj kaj maŝinkoroj. Maŝinoj, vi ne estas! Brutoj, vi ne estas! Homoj, vi estas! Vi havas amon al homaro en viaj koroj. Vi ne hatas. Nur malamataj homoj hatas. Nur malamataj kaj kontraŭnaturaj. Soldatoj, vi ne luktu por sklavigo sed luktu por libero!

En la 17a ĉapitro de la Evangelio laŭ Sankta Luko estas skribite : « La Dia Regno situas interne de la homo ». Ne de unu homo, ne de grupo de homoj, sed de ĉiuj homoj, de vi! Vi, la popolo, posedas la povon, la povon krei maŝinojn, la povon krei feliĉon. Vi, la popolo, posedas la povon igi la vivon libera kaj bela; igi tiun vivon mirinda aventuro.

Do, nome de Demokratio mem, ni uzu tiun povon – ni unuiĝu! Ni kunluktu por nova mondo, deca mondo, kiu ebligas al la homoj labori, kiu donos al la junularo futuron kaj al la maljunularo sekurecon.


Promesinte tiujn aferojn, la brutaloj akiris potencon sed ili mensogis. Tiun ĉi promeson ili ne plenumas; neniam plenumos. La diktatoroj liberigas sin mem sed sklavigas la popolon.

Nun ni lutktu por plenumi tiun promeson. Ni luktu por liberigi la mondon, por forpeli naciajn barilojn, forpeli avidemon, malamon kaj netoleremon. Ni luktu por racia mondo, mondo en kiu scienco kaj progreso kondukos al feliĉo de ĉiuj homoj. Soldatoj, nome de Demokratio, ni unuiĝu!

Hanna, ĉu vi povas aŭdi min? Kie ajn vi estas, Hanna, rigardu supren! Rigardu supren! La nuboj svenas! La suno ekaperas tra! Ni nun iras el mallumo al lumo! Ni eniras novan mondon, pli afablan mondon, kie homoj superos sian malamon kaj brutalemon. Rigardu supren Hanna! La homa animo ricevis flugilojn kaj fine ĝi ekflugas. Ĝi flugas en la ĉielarko, en la lumo de espero – en la futuro, tiu glora futuro, kiu apartenas al vi, al mi kaj al ni ĉiuj! Rigardu surpen, Hanna! Rigardu supren!

***Traduko de la cenona grupeto: Monique, Claudine, André, Marcelo***.

# EL « LA DIKTATORO » – FILMO DE KARLO ĈAPLIN'



## Fina parolado de la filmo (1938)

<u>*Ŝulc':*</u> Parolu vi, jen nia sola espero!

<u>*La barbiro*</u>: Espero… Mi bedaŭras sed mi ne volas imperiestri, tio ne estas mia afero. Mi ne volas regi aŭ konkeri iun ajn. Mi ŝatus laŭeble helpi ĉiun, judon, paganon, blankulon, nigrulon. Ni ĉiuj volas helpi unu la alian ; tiaj estas homoj. Ni volas vivi per ĉies feliĉo, ne per ĉies mizero. Ni ne volas malami kaj malestimi unu la alian. En ĉi tiu mondo estas loko por ĉiu kaj la bona tero riĉas, ĝi povas provizi ĉiun homon. La vivo povas laŭiri vojon liberan kaj belan sed ni perdis la vojon.

Avidemo venenis la homajn animojn, barikadis la mondon per malamo, anserpaŝigis nin en mizeron kaj sangelverŝon. Ni pliigis rapidecon sed enfermis nin mem. La maŝinaro, kiu donas abundon, postlasis nin en bezono. Nia scio igis nin cinikaj; nia inteligenteco, malmolkoraj kaj malafablaj. Ni pensadas tro multe, kaj sentas tro malmulte. Pli ol maŝinojn ni bezonas humanecon. Pli ol inteligentecon ni bezonas afablecon kaj ĝentilecon. Sen tiuj ĉi kvalitoj vivo estas violenta kaj ĉio perdiĝos. Aviadiloj, radio, pliproksimigas nin; la naturo mem de tiuj inventaĵoj krivokas homan bonecon, krivokas universalan fratecon, unuecon de ni ĉiuj.

Ĉi momente mia voĉo atingas milionojn da homoj tra la mondo, milionojn da senesperaj viroj, virinoj, infanoj, viktimoj de sistemo kiu faras, ke homoj torturas kaj enkarcerigas senkulpulojn.

Al kiuj aŭdas min, mi diras: ne malesperu! la mizero, kiu nun pezas sur ni, estas nur pasado de avidemo, amareco de homoj, kiuj timas la progresovojon de la homo. La malamo fine pasos kaj mortos la diktatoroj, kaj la povo, kiun ili deprenis de la popolo revenos al la popolo. Kaj tiel longe kiel la homoj mortos por ĝi, libero neniam pereos.

Soldatoj, vi ne fordonu vin al brutaloj, homoj, kiuj malestimas vin kaj sklavigas vin, regas viajn vivojn, kiuj diras al vi, kion fari, kion pensi kaj kion senti, kiuj trenas vin, fastigas vin, kiuj traktas vin kiel brutojn, kiel kanonbuĉaĵojn.



**<u>PROPAGANDO</u>**:

**<u>Vespero en Samovar</u>**: pere de Jean Seb; partoprenis ankaù Jean-Claude kaj Bernard.

**<u>Festo pri E° en Galgon la 2an de majo</u>**: diversaj ludoj por infanoj ekstere. Deko da familioj venis; tre agrabla etoso; bedaŭrinde neniu skribis raporton por LEGI.

**<u>Mendita filmo pri Esperanto fare de Dominique Gautier</u>** sed ĝi ne estas preta (modifita post Sète).

**<u>Peticio</u>**: disdonita en Libourne en Majo, kune kun afiŝoj; Bernard instigis subskribojn de Jean-Marie DARMIAN kaj Jean-Jacques PARIS, vicprezidantoj de la Ĝenerala Konsilantaro.

**<u>FINANCBILANCO</u>**

39 kotizintoj al Espéranto-Gironde (44 en 2010)
13 aliĝintoj al SAT-Amikaro (14 en 2010)

Enspezoj (de la 01/01/2011ĝis la 24/09/2011) …6.163.88 €
Elspezoj = = ….5.680.77 €
Bilanco ………………………………………… 483.11 €
Ŝparkaso ………………………………… .4.329.62 €

Ni aĉetis videoprojekciilon. Ĝi kostis 421 €.

La urbestraro de Cambes donacis sumon de 2.218.00 € por kovri la elspezojn (1.990.00 €) de la spektaklo de Jacques Yvart kaj Famo en sia urbo. Do profito de: 228 €.
Pour la spektaklo de Kapriol en Libourne, la elspezoj estis 509.80 € parte kovritaj de monpartopreno de la publiko: 132.10 €

Nia komputilo mortis post 5 jaroj.

**Projektoj**:

**Sidejo en Cenon**: supozeble, ni havas tro da ŝrankoj (4); sed tio ne plu estos problemo se ni uzas la kastelon Palmer pli ofte. Nenio kunvencio ekzistas (Léo traktis kun la iama urbestro René Bonnac); ni konsentu prezenti ekzpozicion aù prelegon pri ESPERANTO; devos okazi esperanto evento venontjare kaj poste almenaù unu fojon en la jaro; ni estas tro malmultaj; la unua kunveno tie okazos la 7an de Novembro, kaj ni partoprenos en la Forumo de la asocioj.

**Zamenhof-tago** : propono de Joël: 80 jaroj de Sabine; Sabine konsentas pri alia loko; Marcelo sugestas Cenon Kultur-Centro (tre gravas, ke ni aperu).

**IFEF/E° France: 2013**: Tiuj du Esperantistaj asocioj kune kongresos en Artigues komence de majo 2013. Espéranto-Gironde partoprenos kiel helporganizo.

**Naturamikoj**: esperanto-semajno apud Niort, kadre de naturamikoj somere 2012; organizota de kelkaj el ni; neniu debato.

**Kotizoj**: same kiel pasintjare:
Individue: 17 €
Paro: 23 €
OCAC (Office Culturel d'Animamtion de Cenon): 10 €

**Monhelpoj**:

**Vinilkosmo**: - Grava incendio trafis la laborejon de Vinilkosmo en Donneville. Ni decidis helpi Floréal Martorel per ĉeko (500 €). Ni ricevos savitajn diskojn. Marcelo skizas historion kaj klarigojn pri la lokoj.

**Interkant**: 100 €

**JEFO**: 20 € ĉar Joël mendis senpagajn kalendaretojn uzantaj kiel propagandiloj.




# ZAMENHOF-TAGO EN MARGUERON



Sabaton la 17an de DECEMBRO 2011
En la paroĥa salono apud la preĝejo

## PROGRAMO



**10h -11h15**: kunveno por tiuj kiuj partoprenas en la organizo de la E.Kongreso—Artigues 2013; ĉiuj estos bonvenaj!

**11h15**: Alveno de la ne-esperantistoj
**11h30—12h15**: amikecaj paroladoj
**12h15—13h**: honorvino preparita de Sabine kaj Josette

**13 h:** tagmanĝo: Josette proponas kuiri kuskuson por ĉiuj (modesta financa partopreno estos petata ).
**Pensu alporti vian kompletan necesan manĝilaron, kaj kukojn aŭ aliaĵon por la deserto.**



***Bonvolu anonci vin ĉe Joël, rapide, antaŭ la 10a de Decembro.***

**Posttagmeze:** Distra programo:

**(tiuj kiuj intencas prezenti ion sin anoncu ĉe Joël ĉefe per la reto).**

## OPERO CARMEN KAJ INTERKANT

Pli ol 45 korusanoj renkontiĝis en la Esperanto-Centro Kvinpetalo de Bouresse, en novembro, sub la traktobastono de nia korestrino, Franjo.

Ni profitis de la bela, vasta kaj senpaga festosalono de Bouresse, dum tri tagoj. Dankon al la komunumo. Ni loĝis en komfortaj ĉambroj kaj manĝis bongustajn kaj ampleksajn pladojn ellaboritajn de surloka kuiristo. Ĉiuj helpis por la servado, kaj la etoso estis tre agrabla, tiel kiel la milda kaj suna vetero.

Jam ĉiu hejme laboris dank'al registrado sur la reto. Kaj ni ĉiuj tre bone kore provkantis, viroj, virinoj kaj infanoj. La unua akto ne plu havas sekreton por ni ( ?)

Ni nun atendas la sekvon pere de la reto, kaj rendevuis en majo 2012, en la kastelo de Grésillon por denove kuniĝi kaj kune kanti.

***Monique***



***La unuaj infanoj serioze kantas « taratata... taratata...» Baldaŭ aliaj rekunigos ilin.***





**Spektaklo:**

« ***La sekreto de la magia trajneto*** »: Marcelo proponas novan spektaklon por la Kompanoj, ne kiel la Komuno sed pli proksima al Brassens. Tiu spektaklo estos prezentata okaze de la internacia kongreso, dum Majo 2013, en Artigues.

La laboro finiĝis je la 16a.

Provis protokoli : ***Bernardo***

*Venonta rendevuo* :

***Meze de Marto 2012, ni akceptos Rodica TODOR kiu loĝas en Braŝovo.***

***Ŝi faros turneon tra Francio.***

***Ŝi estas vidvino, 63 jara. Ŝi ankoraŭ laboras kiel psikologino. Ŝi komencis lerni Esperanton en 1995. Ŝi plurfoje venis en Bretonio por renkonti E-klubojn. Ŝi gvidis kurson en la kastelo de Greziljono kaj en Pluezek. Ŝi kutime prezentas prelegon pri Rumanio el geografia, historia, socia, kultura kaj turisma vidpunkto.***

***Joël***

## FORUMO DE LA ASOCIOJ EN CENON
## LA 25AN DE SEPTEMBRO 2011

Marcel, Claudine, Gloria, Bernard, Marie-Rose, Maeva kaj Michel partoprenis en tiu forumo.

Ĝi okazis de la 10a ĝis la 18a horo. La ĉeestantaj asocioj precipe estis :

- sportaj – kulturaj – distraj – homamaj.
-
- La forumo ebligas pli bone koni la altvaloron de la asocia vivado.
-

La asocioj prezentis siajn aktivecojn kaj kelkajn efektivigojn fare de siaj diversaj kluboj kaj atelieroj. Tiuj asocioj deziras varbi anaron sed ankaù aktivajn anojn.

-

Ĉar la forumo estas alirebla al ĉiuj, la publiko povas informiĝi en la budoj.

Por la inaŭguro okazis prezento de ĉiuj asocioj al sinjoro urbestro kaj al vicurbestroj.

Espéranto-Gironde estis prezentita de Marcel.

Nia ĉefa okupo estis: informi la publikon pri esperanto. Ni ankaŭ subskribigis la peticion pri « Esperanto en la abiturienta ekzameno ».

*Michel*







## CHATEAU DE GRESILLON

Venez pour faire la fête, pour séjourner pendant le week-end de la fin de l'année, ou pendant toute la semaine de fin d'année, à partir du 27 décembre jusqu'au 2 janvier 2012.

Venez avec toute votre famille ou vos meilleurs amis. Ils doivent connaître au moins le mot en espéranto : « fantomo ». Pour danser gaiement avec les fantômes du château, déguisez-vous comme eux : parsemé de diamants ou avec des dents de Dracula. Faites une conférence sur des maisons hantées ou animez sur un autre sujet.



***Lieu : Château de Grésillon*** : http://gresillon.orgfindanneeInscription:

http://gresillon.org/spip.php?rubrique27

***Jose Maria Rodriguez Hernandez (Cordova, ES) a signalé l'existence d'une île de l'Espéranto autre que celle de l'Antarctique : d'après une information de l' »Enciklopedio de Esperanto », la ville de Rahovo, maintenant en bulgare Oryahovo, a concédé au groupe d'espéranto de la ville une île du Danube de 108 hectares. Le nom est vraisemblablement encore celui qu'il est possible de voir sous ce beau nom, avec Google Earth. Cherchez la ville d'Oryahovo en Bulgarie et, face à la ville de Leskvotets (Leskovets) se trouve ce que Google Earth nomme « Esperanto island ». Il est même possible de voir des pbotos. L'île est très belle, et il y a quelque chose qui ressemble à une plage.***

***H.Masson***